

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 538

SEPTEMBRO 1950

KONGRESA NUMERO



[Foto: Eclair-Continental]

Tipa grupo en Parizo

LA "EPOKO" LIBROJ

Serio de interesaj romanoj k.s. por la distra horo

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
108 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.
8. **La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj.**
Originale verkitaj de Mason Stuttard.
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.
9. **Brulanta Sekreto kaj aliaj rakontoj.** Stefan Zweig.
El la germana tradukis K. R. kaj P. Schwerin.
160 paĝoj. 4ŝ. aŭ 16 respondkuponoj aŭfrankite.

Eldonitaj de
THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD., ANGLUJO

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

aŭ ĉe

en Belgujo :	Belga Esperanto-Instituto aŭ Flandra Esperanto-Instituto.
Brazilo :	Brazila Esp.-Ligo aŭ I. Gomes Braga.
Britujo :	British Esperanto Association.
Danlando :	Libroservo de Centra Dana Esperanto-Ligo.
Finnlando :	Eldono Vilho Setälä.
Francujo :	Esperantista Centra Librejo aŭ S.A.T.
Germanujo :	Siegfried Ziegler Verlag.
Italujo :	La Ĉefdelegito de UEA.
Maroko :	La Peranto de UEA.
Nederlando :	Libroservo de LEEN ; libroservo F.L.E., Heroldo de Esperanto ; aŭ Internacia Esperanto-Instituto.
Norvegujo :	Esperantoforlaget A.S.
Svedujo :	Eldona Societo Esperanto.
Svislando :	La Ĉefdelegito de UEA.
Usono :	E.A.N.A.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu, kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Antonio Pastor, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Kuracisto sesdekjara deziras diskuton kun gesamideanoj pri ebleco fariĝi centjaraĝa. D-ro Wegener, (22a) Essen, Hollestr. 1, Germanujo.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Filatelistoj, fotograf-amatoroj, il. pk. kolektantoj skribu multnombre el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Radnai Vilhelmo, Fókai u. 14, Miskolc, Hungarujo.

Ernesto Schlesinger, str. Molotov 22, Cluj, Rumanujo, serĉas seriozajn pm. rilatojn en U.R.S.S., U.S.A., Francujo, Benelux - landoj, Svislando, kaj koloniaj landoj. Respondas nur seriozajn sendaĵojn. Bazo laŭ interkonsento. Sendaĵoj garantiataj tra ŝtata banko.

45 gekursanoj deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per ilus. poŝtkartoj. Adreso: S-ro R. Parera Marimon, "A. E. Tierra y Mar", Esperanto-fako, Virgen de la Salud 2, Sabadell, Hispanujo.

Helpu Hispanujon por la revivigo de la Esperanto-movado! Ni bezonas por nia ekspozicio okazonta dum Januaro materialon: salutleterojn, ilustritajn poŝtkartojn (poŝtmarkoj bildflanke), afiŝojn, revuojn, k.t.p. Sendu ĉion al "A. E. Tierra y Mar", Sekcio Esperanto, str. Virgen de la Salud 2, Sabadell, Hispanujo. Respondo garantiata.

Ĉambro, duobla lito, por samideanoj libertempe. Po £1 semajne; mem-kuirado. Skribu al Ges-roj Mallows, 114 Tottenhall Road, Palmers Green, London, N.13, Anglujo.

Esperanto - Societo Hannover preparas grandstilan varbekspozicion por komenco de Novembro. Ni petas pri salutkartoj kaj alia materialo el ĉiuj landoj, al Horst Michling, Hannover - Kirchrode, Steinbergstr. 1, Germanujo.

Juna piloto-studento deziras korespondi kun fraŭlinoj kaj fraŭloj el tutmondo. E. Ostrowski, Zymierskiego 11, Lowicz, Polando.

Volas korespondi letere pri okultismo (ne pri spiritualismo) L. W. Graham, G.P.O. Box 5334 BB, Melbourne, Aŭstralio.

Intencante aranĝi Esperanto-ekspozicion mi petas, ke la samideanoj bonvolu sendi varbilojn, afiŝojn, broŝurojn, librojn, leterojn, poŝtkartojn, kantlibrojn, k.t.p. Multan dankon antaŭe. Sendaĵoj al Hans Raab, Austr. 84, Nürnberg 7, Germanujo.

Prof. Pedro Calvo, Plaza Mayor 11, Palencia, Hispanujo, 26-jara, deziras ricevi fotografaĵojn de fraŭlinoj el tutmondo. Sendos aliajn rapide.

Filatelistoj! Por 50 (ne)uzitaj pm. ordinaraĵoj, memorigaĵoj, aŭ aerpoŝtaĵoj, samkvante kontraŭsendos Remigio Novak, via Pascoli 23, Trieste (210), Italujo.

Fuĝinto el Polujo loĝanta hodiaŭ en sudgermana grandurbo serĉas gekorespondantojn per pk. ilustritaj en ĉiuj neeŭropaj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos. Ne korespondos pri politiko. Jan Resewski, Am Seelachwald 3, Stuttgart-Weilimdorf, Germanujo.

Aŭstralio filatelisto deziras korespondi kun Esperantistoj en aliaj landoj. David Owen, 77 Gosford Road, Broadmeadow, Newcastle, Aŭstralio.

Aŭstralio filatelisto kaj fervojisto deziras korespondi kun Esperantistoj en aliaj landoj. Bill Jansen, 22 Queen Street, Cooks Hill, Newcastle, Aŭstralio.

Lernantoj kaj progresintoj de nova klubo deziras korespondi kun Esperantistoj en aliaj landoj per il. pk. aŭ leteroj pri interesaj aferoj. Perry Rees, 123 Ingall St., Mayfield, Newcastle, Aŭstralio.

Knabino okjara interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn tutmonde. Regina Coeli, rua São João 224, Niteroi, Brazilo.

Adressanĝo. Nova adreso por F-ino Nesta Ford estas 85 Namu Road, Bournemouth, Anglujo.

Argentina grupo korespondas. Skribu al Jorge Bondone, Irigoyen 428, Bell Ville (Córdoba), Argentino.

Esperanto-grupo Herford aranĝos letervesperon meze de oktobro. Skribu al Werner Flick, (21a) Bad Salzuflen, Postfach, Germanujo. Respondo garantiata.

Plastikajn verdstelojn tricentimetrajn: blanka fono, sekurpingleto—10 rpk. aŭ egalvaloraj esperantaĵoj, ĉe De la Croix, Box 1661, Rochester, New York, Usono.

Plej sincere dankas al la gesamideanoj en Hannover, München, GEA, Ettal, Bad Kohlgrub, Treysa, Innsbruck, Stams, Venezia, Verona, Strasbourg, Vienne, Romans, Nice, Grenoble, Grasse kaj al UEA pro altvalora helpo al miaj *du karavanoj* kaj pro vigla kontakto. L. Friis, Aabyhøj, Danlando.

Italujo, Milano. Mi apartenas al Kristana Esperantista Ligo Internacia, kaj mi intencas dum la venonta somero vojaĝi al Italujo. Pro tio mi deziras korespondi kun persono, kiu loĝas en Milano aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo. Popollernejinstruisto Torsten Gelin, Venjan, Svedujo.

André Ribot, Instruisto, Rue Vergnes, Marmande (L. & S.), Francujo korektas leterojn france kaj esperante skribitajn kontraŭ 3 stampitaj respondkuponoj. Anonco ĉiam valoras.

Deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj; nepre respondos: F-ino Vlasta Ursiĉ, Ilica 169, Zagreb VI, Jugoslavujo.

Danlando vokas vin

kaj invitas vin partopreni la aŭtunajn internaciajn feriajn aranĝojn (konversacia kurso kaj prelegoj) en la Sporta Altlernejo de Vejle. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

OKTOBRA NUMERO

Pro premo de materialo pluraj tekstoj ne povas aperi en la Kongresa Numero. Tial en la oktobra numero aperos kelkaj fotoj de la Kongreso kiel ankaŭ diversaj raportoj, inkluzive de la *Transdono de la Petskribo en Lake Success* kaj *Gazetara Servo*.

HELPU LA ADMINISTRADON

per frua pago de via kotizo 1951. Antaŭdankon!

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 538

KONGRESA NUMERO

SEPTEMBRO 1950

Parizaj Impresoj

Manifestacio tia postulas priatenton pri tre multaj etaj kaj egaj detalaĵoj kaj donas eblecon kritiki. Kiu objekte ekzamenas faktojn kaj faktorojn sed ne sekvas blinde rapide eldiritan rimarkon, naskiĝintan el momenta malbonhumoro, miskompreno aŭ eĉ de malbonvolo, venas al pli justa konkludo. Kiu nenion faras, neniam eraras, kaj tiu danku Dion. Aganto celkonscia iel incitas kritikadon. Plendemuloj inter ni bonvolu nur konsideru la homan econ, ne legi informojn, malatenti datojn, ignori la plej elementajn devojn. Kaj en tio precize troviĝas la fonto de plendoj. Ĉion konsiderante, ni rajtas senrezerve diri, ke ne estis plendoj atentindaj. La organizantoj vere meritis por la bono de nia afero.

Tridek kvin kongresoj jam okazis kaj la observema vizitinto de la kongresoj post la unua milito facile konstatas, ke nevideble ŝanĝiĝis la aspekto de nia jara manifestacio. Ne plu estas la unuopuloj, kiuj varme kaj elokvente proponas, diskutas kaj eĉ disputas pri io dum la kunvenoj. La afero ne plu dependas de la unuopaj pioniroj, sed de organizita movado, gvidata de libervole laborantaj fervoruloj, agantaj laŭ decidoj kaj plano. Alivorte, la individuo restas, sed li dependas de kolektivo, ĉu de komitato, ĉu de estraro, kiu laborigas lin kaj kiu siavice respondecas antaŭ siaj elektintoj. Konsiderinde kreskis ankaŭ la objektoj diskutataj kaj decidataj tiel, ke kunvenoj de komitato iel similas ĝeneralan kunvenon de impona entrepreno. Ni vidu en tiu ĉi fakto signon de evoluo ankoraŭ ne finiĝinta.

La 35-a Kongreso de Esperanto jam estas historiaĵo. Nenio okazis kio povis nuligi ĝin, kiel en jaro 1914, malgraŭ tio, ke la situacio aspektis timiga. Kunvenis pli ol 2300 kongresanoj, kiuj reprezentis 35 landojn. Impresa nombro se oni konsideras la influon de la gravaj malsanoj de nia tempo: vizo kaj devizo! Supozante normalajn kondiĉojn de vojaĝo kaj de monricevo, ni certe estus kalkulintaj por la 35-a pli ol kvinmil partoprenantojn, pruvo plej elokventa pri la popoleca karaktero de nia movado.

Parizo, magia vorto elvokanta sopiron kaj deziron! La konatan "Vidi Napolon kaj morti" oni povus konkurenci per "Vidi Parizon kaj vivi"! La vivpercepto galica estas esprimebla per simpla frazo: *Ni vivu, kaj ni lasu vivi la aliajn*. Nenio estas pli falsa ol la ideo, ke en Parizo oni nur amuziĝas, ke la parizanoj estas nuraj ĝuemuloj, facilanimaj kaj amuziĝemaj. Estas la fremduloj, kiuj amuziĝas. La indiĝeno estas ĝenerale sobra, laboregas dum la semajno kaj bone vivas en la dimanĉo.

En tia atmosfero de libereco nia kongreso havas alian karakteron, ol en aliaj lokoj. Sed ne imagu al vi, ke la anoj de la 35-a amuziĝis senlime kaj evitis la kongreson. La Loka Kongresa Komitato, konante la parizan bacilon, zorgis antaŭe kaj preparis serumon kontraŭ tiu ĉi (amata) malsano, la amuziĝemo. Ĝi konsistis en aro da aranĝoj bonege sukcesintaj: Somera Universitato kun prelegoj superaj (la vorto *interesaj* ne redonas ekzakte la karakterizon), laborkunvenoj dividitaj en kvar sekciojn, vizito al ekonomiaj establoj kaj laste sed tamen egale bonaj, distraĵoj ne banalaj, inter ili la Kabareto direktita de Raymond Schwartz, kaj la Varietea Vespero.

En metropolo kun kelkmilona loĝantaro kongreso eĉ multmila perdiĝas en la amaso. Parizo estas escepto en tiu senco, ke la Kongreso okazis en la fama Latina Kvartalo kaj ĉio koncentriĝis en la tre respektinda kaj estiminda *Sorbonne*, kiu dum ok tagoj formis la centron de nia manifestacio. Multe altiris la atenton la belaj kostumoj naciaj portataj kun eleganteco de niaj ĉarmaj kongresaninoj. Same la publiko atentis pri la ĉie aŭdebla lingvo kaj ne malmultaj estis la homoj, kiuj okaze de konversacio kun kongresano promesis al si lerni la internacian.

Resume ni povas sincere ĝoji pri la bonega kongreso. Finiĝis la 35-a. Jam oni eklaboras por la 36-a, kiu okazos en la bavara ĉefurbo München, kiu estas la *ĉefurbo de la movado* . . . de Esperanto en Germanujo. Laŭ ĉio kion ni sciigis la 36-a estos inda sekvanto de la 35-a.

Hans Jacob

35-a Universala Kongreso de Esperanto

Parizo 5-12 Augusto 1950

Necesa antaŭrimarkigo

*La nuna raporto pri la 35-a Kongreso ne estas protokolo, kiu fidele redonas la erojn de tiu ĉi multaspekta okazaĵo. Ĝi estas rakonto en libera formo de kelkaj kunlaborantoj de nia revuo, kiuj dispartigis inter si la diversajn partojn. Unue ni donas la parolon al nia kunlaboranto **Georges Agricola**, kiu rakontas siajn impresojn pri la Malfermo kaj la Fermo de la kongreso (Redakcio).*

LA SOLENA MALFERMO

Sunbrila dimanĉo, la sesa de aŭgusto 1950. Gaje alvenas ĉe la Sorbono centoj kaj centoj da insigno-ornamitaj kongresanoj, fervore babilantaj, salutantoj per paroloj kaj manoj la amikojn. Tute la atmosfero de kongreso dum kiuj ĉiuj parolas unu lingvon, tiun ĉi miraklon de nia epoko, Esperanto. Eĉ ĝisosta skeptikulo ne povas resti neimpresita de tiu ĉi fenomeno, realiganta en malgranda skalo la devizon: *Unu homaro kaj unu lingvo*.

La kadro de la ĉefa ero de la kongreso estis la Sorbono, la fama universitato evoluinta el la *Maison de Sorbonne*—komence kunvenejo por malriĉaj studentoj de teologio—do *ejo*, sed ne *institucio*. Grandioza kadro por nia kongreso, kie ĉio koncentriĝas. Ĝentila gesto de la Urba kaj Universitata Aŭtoritatoj, meti ĝin je la dispono de la Universala Kongreso.

La Granda Amfiteatro (en iuj landoj oni nomas ĝin *aŭlo*) pleniĝas de kongresanoj ĝis en la lasta angulo. Belega tiu ĉi *ejo*, kies fonon ornamas murpentraĵo de Puvis de Chavanne, simboliganta la Sorbonon. Kaj ĉirkaŭe marmoraj statuoj de distingitaj homoj, Robert de Sorbon, Kardinalo Richelieu, Descartes, Lavoisier, Pascal kaj Rollin. Se nur Descartes estus povinta vidi tiun ĉi homamason parolantan *artefaritan* lingvon, pri kiu li skribis profete en 1629:

La artefarita lingvo estas ebla kaj oni povas trovi la sciencon, de kiu ĝi dependas. Kun la helpo de tiu lingvo, vilaĝano juĝos pri la esenco de la aferoj pli facile ol nuntempe juĝas la filozofoj!

Silento. Eniras la gvidantoj de la neŭtrala movado kaj okupas la seĝojn de la podio, super kiu flirtas la granda flago kun la nomoj de la kongreslokoj: Bern, Malmö, Bournemouth, nova epoko de nia historio. Eksonas la entuziasmiga kanto de Rouget de l'Isle, deveninta de la nacia himno franca. Eble iuj trovas, ke ne estas la ĝusta loko por tiu ĉi kanto, sed tio estas la kutimo kaj tion ni akceptu.

Malfermas la kongreson **Georges Warnier**, kiu kvankam sekvinta la neeviteblan maljuniĝon, vige kaj junece parolas kiel antaŭ 18 jaroj.

Sprite li montras la dilemon de oratoro, demandinta pri la longeco de kongresparolado. El dudek minutoj, laŭ konsilo de Profesoro Lapenna kaj kvin minutoj, de la Prezidanto de U.E.A. li elektas la lastan. Li reiras la jaron 1914 kiam devis okazi la *Deka*, tiu ĉi unua kurbiĝo en la evoluo de la movado, kie li jam funkciis kiel sekretario, kaj 18 jarojn poste, kiam li en 1932 prezidis la 24-an kongreson. Se ni sekvos la saman ritmon de 18 jaroj ni ree kunvenos en jaro 1968 en Parizo! Li resumas la diversajn fazojn de la organiza laboro por la nuna kongreso kaj esprimas koran dankon al ĉiuj, kiuj kunhelpis per laboro kaj partopreno.

Sekvas lin la prezidanto de U.E.A., **Ernfrid Malmgren**, kiu opinias, ke Parizo estas ja tiom alloga, ke oni ne miru pri la alta nombro de la partoprenantoj. Li aliĝas je la dankvortoj al la organizantoj, kion la kongresanaro substrekas per vigla aplaŭdo.

Kiel kongres-estraro estas proponataj kaj akceptataj sen kontraŭstaro:

Prezidanto: S-ro Georges Warnier

Ĝenerala Sekretario: S-ro Jean Couteaux

Sekretario: S-ro O. T. Nicolaisen.

La parolvico estas al la reprezentanto oficiala de la Ministro por Edukado, **Profesoro Frechet**, kiu transdonas la salutojn de la Ministro per jenaj vortoj (en Esperanto):

“Ĉiu Franca Ministro de la nacia edukado sentas sin nature simpatia al iu organizo, kiu povas helpi la diverslingvajn homojn interkompreniĝi, kaj kiu sekve kontribuos al la paco.

Pro tiu kaŭzo la lasta ministro de la nacia edukado, Lia Moŝto Yvon Delbos, kaj ankaŭ la nuna, Lia Moŝto Lapie, akceptis esti reprezentata en tiu ĉi kongreso.

En via nomo mi dankas ilin, kaj en ilia nomo mi eldiras bonvenon al vi en nia Francujo kaj mi deziras sukceson al via laboro.”

Sekvas la salutojn de la Ministro por Industrio kaj Komerco, kiun reprezentas **Sinjoro Dusausoy**, jene:

“En la nomo de Sinjoro Ministro de Industrio kaj Komerco mi estas feliĉa eldiri bonvenon al vi, Esperantistoj el 34 landoj. Tiu ĉi kongreso donos al mondo novan pruvon, ke Esperanto estas nepre necesa por faciligi la rilatojn inter ĉiuj popoloj ĉar en via kongreso ĉiuj komprenas sin sen interpretisto.”

Danka aplaŭde flanke de la kongresanoj sekvas la alparolojn de la du reprezentantoj.

Ĉeestas krome S-ro **P. Saint Cyr**, reprezentanto de la Ministro de P.T.T.

Estas la parolvico de la reprezentanto de UNESCO, la plej grava branĉo de UN, **Sinjoro Jean Thomas**, Ĝenerala Direktoro. Uzante francan lingvon la parolanto petas senkulpigon, ke li ne povas paroli en nia lingvo, kiun li cetere povas bone kompreni. Li klarigas la laborojn de UNESCO, la gravecon kiun havas por ĝi la lingva problemo, kaj inter tio la demando pri facile lernebla internacia lingvo. Li substrekas la intereson, kiun renkontas nia movado en la servoj de UNESCO kaj akcentas la pretecon je kunlaboro por praktikaj celoj realigeblaj nuntempe. Li memorigas la jam ekzistantajn eblecojn kaj certigas pri la ĉiama preteco de la organizaĵo, kiun li direktas, ekzameni tiajn eblecojn. Li fine gratulas la Esperantistojn pro ilia laborado kaj deziras al la 35-a Kongreso ĉian sukceson.

La alparolo de tiu ĉi oficiala sendito, laŭ formo kaj enhavo vere elstara, vekis grandan entuziasmon inter la kongresanoj. Longa forta aplaŭdo kronis ĝin. **F-ino Huguette Royer** lerte servis kiel interpretistino.

Laŭtradicie sekvas la salutoj de la nefrancaj registaroj delegintaj reprezentantojn.

Aŭstra Registaro : D-ro Sirk

Belga Ministro por Edukado : D-ro P. Kempeneers

Brazila Registaro : S-ro J. Guimaraes Rosa (sekr. de ambasadorejo)

Nederlanda Registaro : S-ro J. R. G. Isbrucker

Norvega Registaro : Kapitano R. Bugge-Paulsen

Sveda Registaro : S-ro Helmer Almen

Svisa Registaro : S-ro Daniel Gagnebin

Urugvaja Registaro : S-ro Franco Rossi (unua sekr. de ambasadorejo) (*parolis en posta tago*).

La paroloj de ĉi tiuj oficialaj senditoj, plejofte samideanoj, varias inter la severe oficiala kaj sekve konvencia saluto, kaj deziro je sukceso kaj nenio plu. Escepton en tio faras kutime **S-ro Ing. Isbrucker**, kiu en ĉiam sprita maniero ligas la oficialan devon kun la filozofia konsidero de malnova batalanto. Li aludas pri la leĝo de la serio en la vico de niaj kongresoj parizaj : 1914–1932–1950 kaj memorigas, ke ni ja kunvenas

proksime de la Elizeaj Kampoj, avertas pri la danĝero minacanta la homaron, kaj insistas ke nur sincera kunlaboro interpopola povos savi la mondon de pereco. Mencias la 16 milionojn, kiuj subskribis la petskribon al UN por akceli Esperanton kaj opinias, ke se oni atentus tiun ĉi deziresprimon, jam granda paŝo en la konservo de la paco estus certa.

La efektivan festparolan de la Kongreso faras la nova stelo je la oratora firmamento, **Prof. D-ro Ivo Lapenna**. La cito de lia nomo jam elvokis bruan entuziasmon ĉe la kongresanoj. Kaptita per la personeco de la oratoro, kiel per la formulitaj pensoj, mi konfesas, ke mi ne faras notojn, kaj nur nun resume kaj nesufiĉe redonas tion, kion mi memoras. Li ĉefe insistas pri tio, kaj martelas tion en la menson de ĉiuj, ke Esperanto estas antaŭ ĉio kultura movado, ne simpla lernado kaj uzado de lingvo. Nia lingvo, kapabla hodiaŭ esprimi ĉion per vortoj, donas al ni la eblecon transformi tion en agojn. Eraro estas kredi, ke lingvo sola sufiĉas. Necesas la arda fajro de optimismaj homoj kredantaj je la morala progreso de la homaro, malgraŭ ĉio kio okazis aŭ eble ankoraŭ okazos. Ni estu falango de tiuj kiuj laboras por la paco, justeco, frateco, libereco. Nia movado estas mozaiko, konsistanta el multaj nacioj, religioj, el ĉiuj sociaj tavoloj. Ligas nin ne nur unu idealo, tiu de lingvo, sed la brulanta deziro je paco intergenta. Kiel defendantoj de altaj kaj eternaj homecaj idealoj ni sentas nin antaŭ ĉio filoj de la tuta homaro, homoj inter homoj. La esprimo de nia volo kontribui al la paco estas la ĉiujara kongreso, kiu estante Esperantista, estas la plej elokventa pledo por la paco. Ni montru nin indaj disĉiploj de D-ro Zamenhof, kiu, kreinte la lingvon, ne pensis je la materiaj profitoj eltireblaj iam, sed ĉefe kaj unue al la morala leviĝo de la homaro. . . .

Nefiniĝanta aplaŭdo montras al la verva parolinto, ke li sciis tuŝi kordojn plej karajn de la aŭskultantoj. Ĉiu konsciiĝas, ke ĉi tiu parolo venis el koro kaj el sento malproksima de ĉia deziro nepre impresi.

La prezidanto de la Kongreso, S-ro Warnier, per kelkaj vortoj kaj manpremo dankas la oratoron.

Estas la parolvico de la reprezentantoj de la Landaj Asocioj, komisiitaj saluti la kongreson. La paroldaŭro estas limigita je du minutoj kaj ĉar ĉiuj ja diras esence la samon, mi citas ĉi-foje nur nomon de la lando kaj tiun de la delegito.

Aŭstralio : S-ro G. Cettini, **Aŭstrujo** : D-ro H. Sirk, **Belgujo** : S-ro J. Plyson (R.B.L.E.) D-ro F. Couwenberg (Fl.L.E.), **Brazilo** : S-ro B. Camozato, **Britujo** : S-ro W. A. Gething, **Danlando** : S-ro O. C. Lange, **Egiptujo** : S-ro Tadros Megalli, **Finnlando** : S-ro J. Vilkki,

Francujo : S-ro J. Couteaux, **Germanujo** : Pastro Böcker, **Hispanujo** : S-ro I. Alvarez, **Irlando** : S-ro O. Cuirc, **Izraelo** : S-ro Naĥum Drezner, **Italujo** : S-ro J. Saggiori, **Jugoslavujo** : S-ro Ivo Borovečki, **Maroko** : S-ro Ch. Thollet, **Nederlando** : S-ro C. B. Zondervan, **Norvegujo** : S-ro J. H. Rosbach, **Novzelando** : S-ro D. R. Kemsley, **Svedlando** : S-ro Lennart Åberg, **Svislando** : S-ro W. Laederach, **Usono** : S-ino D. Tappan Connor.

Finiĝas la tagordo per ĉi tiuj salutoj. Sekvas ankoraŭ kelkaj administraj informoj donitaj de la prezidanto, S-ro Warnier. Kaj jen venas la solena momento: kanto de la Himno. La prezidanto atentigas, ke la Esperantista himno ne estas funebra kanto, sed komponita laŭ ritmo de milita marŝo. Kvankam ni estas pacaj batalantoj ni tamen estas viglaj kaj sekve ni kantu vigle. La himno eksonas kaj finiĝas la malfermo de la kongreso.

* * * *

Ĉe tia manifestacio, ne direktebla kiel milita operacio, dependa de multaj faktoroj simple ne regeblaj de la organizantoj, ekestas kritikoj. Ili estas malmultaj kaj ne gravaj. Iuj kongresanoj parolis al mi kaj akre kondamnis la enirmuzikon, la nacian himnon francan. Ili opiniis, ke tiu ĉi teksto ne respondas al nia paca movado. Mi jam diris, ke estas kutimo en Francujo, komenci kongreson per la nacia himno enlanda. Ĝi estas ceremonio tradicia pri kiu ni ne juĝu. Ĝenerale, naciaj himnoj, kaj tio valoras por la plimulto, ne plu respondas al la nuna tempo laŭ la teksto el pasinta epoko. Ni ne tro severe konsideru tion. Alia rimarko estas pri videbla manko de

soleneco. La Loka Komitato jam dekretis, ke oni ne enlasu iun, kiu venos post la horo fiksita, t.e. 9.30, por ne ĝeni per malfermo kaj fermo de pordoj. La kongresanoj estis disciplinaj—oni devas tion rekoni—kaj alvenis ĝustatempe. Belec-manko estis, ekzemple la foresto de floroj aŭ de verdaj plantaĵoj (laŭroj, k.t.p.) kio povus solenigi la podion. Alia rimarko koncernas la solenan eniron. Iam, mi ne plu scias je kiu kongreso, estis muziko, trumpetsignalo aŭ io simila, kiu signis la eniron de la kongresa estraro kaj de la oficialuloj. Ni ne tro malalte taksu tiajn detalojn. Aliaj pli gravaj movadoj, organizaĵoj kaj ĉefe registaroj respektas tion kaj havas specialan servon pri tio. Feliĉe neniuj pekis kontraŭ la sinteno deca, nek promenis en stranga vestaĵo, fremda por la enlandanoj, kies kritikemon ni ĉiam devas priatenti.

La kadro de la malfermo ja estis sen ia troigo grandioza. La amfiteatro de la Sorbono ĉiel subtenas la neceson je digno. Tial la foresto de naciaj flagoj, kies koloroj kaj aranĝo kunhelpas je vigleco kaj soleneco, ne rimarkiĝis.

La amfiteatro estis tute plena. Partoprenis la kongreson inter 2100 kaj 2200 (preciza cifero ĉi-momente ne estas ricevebla). Se reprezentantoj el gravaj landoj, kiuj pro politikaj cirkonstancoj (ni diru ĝin ĉar estas vere) ne povis sendi delegitaron, estus povintaj veni, la L.K.K. estus starinta antaŭ grava dilemo: trovi lokon, kiu respondus al la du postuloj, spaco kaj digno.

La Malfermo, kiun ĉiu L.K.K. rigardas ĉiam kun ia zorgo, bone pasis. Kaj bona komenco antaŭdiras bonan sinsekvon de la cetera programo. Ni vidu, ĉu tio okazas en Parizo. . . .

Gustav Kuhlmann :

La Ĝeneralaj Kunsidoj

IMPRESOJ



En la 35-a U.K. oni enkondukis novan formon por la laboraj (nun nomataj *ĝeneralaj*) kunsidoj. Antaŭe oni havis la grandajn kunvenojn en kiuj partoprenis pli aŭ malpli vigle la kongresanaro, sed por la nuna jaro estas inaŭgurata tute nova sistemo, nome *la sekcioj*. La aranĝo estas, ke la laboro por la disvastigado de

Esperanto estas dividita en kvar sekciojn, kiuj estas apartigitaj en diversajn grupojn. (Vidu la respektivajn raportojn aliloke).

Oni povis konstati, ke la kvar sekcioj enhavis en sia laborplano sufiĉe vastan programon kaj se oni estus diskutinta tiom da punktoj en grandaj komunaj kunvenoj verŝajne la kongreso ankoraŭ daŭrus aŭ almenaŭ tute ne havus la eblecon pritrakti ĉion.

Evidentiĝas, ke tia formo de labor-organizo en sekciojn havas grandajn avantaĝojn kaj ke oni certe devus rekomendi tiun formon por estontaj kongresoj. Avantaĝo estas, ke oni partigas la kongreslaboron laŭ intereso de la kongresanoj, kiuj povas laŭ sia intereso aŭ faka laboro viziti tiun sekcion, kiu plej konvenas. Oni samtempe



Oficiala akcepto en la urbdomo. S-ro E. Malmgren parolas en la mikrofono.

[Foto: Eclair-Continental]

ŝparas multe da tempo ĉar la nombro de partoprenantoj en la unuopaj sekcioj malgrandiĝas kaj la traktado de la diversaj temoj fariĝas pli konciza. Kongresano deziranta ĉeesti certan punkton de la poresperanta laboro, ne bezonas perdi tempon ĉeestante grandan kunvenon, kie pro nebona akustiko aŭ teknikaj mankoj, li eventuale ne povas sekvi la traktadon.

Estas tamen rekomendinde, ke en estontaj kongresoj la raportoj de la stato je la momento, kaj atingoj de la diversaj gvidantoj estu frue antaŭ la kongreso kolektitaj por prezento antaŭ la ĉeestantoj ĉe la komenco de la sekcia laboro. Oni parte tion faris, sed ne tiom vaste, kiom oni povus deziri. Estus dezirinde krome en bona tempo elekti reprezentanton en ĉiu lando, kiu havu la respondecon raporti pri la poresperanta agado en sia lando. Tiamaniere oni evitus, ke du aŭ pluraj personoj de sama lando eluzu tempon pri sama afero, dum eble mankas raportoj de aliaj landoj. La tempon tiel ŝparitan oni povus

uzi por diskuto kaj interŝanĝo de bonaj ideoj.

Antaŭ ĉio oni zorgu, ke papero estu je dispono de la sekretarioj, kaj ke la parolantoj restu ĉe la temo pritraktata. Utilus se oni povus zorgi pri la parola kvalito de la parolantoj. Ili parolu laŭte kaj koncize, sed ne faru kiel unu parolanto en la sekcia laboro, kun cigaredo en la mano. Tio montras malrespekton al la publiko kaj donas malbonan impreson.

Post la laboroj de la sekcioj oni faru konkludojn pri la atingitaj rezultoj kaj ilin prezentu al la kongresanaro en komuna kunveno en la fino de la kongreso.

Aranĝante tiel, oni verŝajne atingos la plej grandajn rezultojn kaj simpligos la kongresan laboron. La aranĝoj en Parizo estis plejparte kontentigaj kaj se oni utiligos la spertojn en venontaj kongresoj, la formo de kongresa laboro, kiun oni unuafoje iniciatis en la 35-a, certe montriĝos la plej valora.

Unua Sekcio: Esperanto en la Lernejoj

En la Unua Sekcio ni pritraktis la temon laŭ la jenaj subsekcioj: “Esperanto (1) en la unuagradaj lernejoj (aĝoj 11–12)”; (2) en la duagradaj lernejoj (aĝoj 12–18)”; (3) en supera edukado”; (4) inter la blinduloj kaj surduloj”; (5) inter la junularo”, kaj (6) en sporto.”

(1) Esperanto en unuagradaj lernejoj :

Raportoj alvenis de pluraj landoj sed eblas citi nur erojn kun ĝenerala kaj vasta intereso. En **Svedlando** Sveda Eldona Societo eldonis specialan lernolibron por infanoj. La unua eldono el 3000 ekzempleroj jam estas elĉerpita kaj dua eldono el 5000 estas en preparo. En **Anglujo** kaj **Kimrujo** la Ministerio de Edukado permesas la instruadon de Esperanto en lernejoj dum lernejhoroj sed decido dependas de la lernejestro aŭ loka lerneja aŭtoritato. En **Skotlando** tiu ĝenerala permeso ne validas. En **Francujo** la sinteno de instancoj estas favora.

(2) Esperanto en duagradaj lernejoj :

En **Anglujo** proksimume 1.400 infanoj ricevas instruon dum lernejaj horoj, kaj entute 1500 en 21 lernejoj. La brita raporto komentas, ke la interlerneja korespondado ofte estas mallongedaŭra kaj unu kaŭzo estas *deziro uzi Esperanton por lerni la anglan lingvon!* B.E.A. eble estas unika en tio, ke ĝi havas Edukan Sekretarion, kiu responde al invitoj kaj sen pago, pasintjare faris provlecionojn aŭ mallongajn kursojn en 60 lernejoj en Anglujo. Dum tiu tempo li alparolis pli ol 6.000 lernantojn kaj 200 geinstruistojn, al kiuj li vendis preskaŭ 4.000 Esperantistajn librojn. En **Nederlando** preskaŭ la tuta instruado okazas ekster lerneja tempo, sed oni instruas la lingvon al proksimume 1.000 geinfanoj en 33 lernejoj. **Francujo** raportas pri proksimume 700 geinfanoj inter 12 kaj 18 jaroj ricevantaj instruon, aŭ dum, aŭ ekster lerneja tempo. Interesa afero ĉe ili estas, ke multaj lernejoj havas propran Esperantan gazetan (multobligitan), kiun ili interŝanĝas kun aliaj lernejoj, eĉ eksterlandaj. Kolektiva korespondo estas populara kaj rezultigas iafoje feliĉajn sekvojn. Ekzemple dek knaboj en franca lernejo aranĝis viziton al tirola vilaĝo kie loĝas iliaj korespondamikoj. Estas tre verŝajne, ke tiuj knaboj, interfratiĝinte sur la belaj kampoj de Tirola ne volonte interbatalos sur sanga batalkampo en la estonteco.

(3) Esperanto en supera edukado :

Oni instruas Esperanton en la jenaj universitatoj: Innsbruck, Graz (Aŭstrujo); Liverpool (Anglujo); Mainz, München (Germanujo); Krakow, Łódź (Pollando); Otani (Japanujo).

(4) Inter la blinduloj :

En **Britujo** la nombro de blindaj Esperantistoj estas 80 el kiuj la plimulto regule legas la brajlan gazeton *Esperanto-Ligilo*. Kurso okazas en la Reĝa Normala Kolegio por blinduloj, kaj la Nacia Biblioteko en Londono disponigas Esperantan fakon de brajla literaturo. Noto pri **Svedlando** atentigas, ke oni anstataŭigis la multjaran instruon de Esperanto en blindula lernejo per angla lingvo, kun bedaŭrindaj rezultoj. En **Danlando** kaj **Norvegujo** oni instruas Esperanton en blindullernejoj. En **Nederlando** pluraj ekleziaj, kaj unu neŭtrala, blindul-lernejoj havas kursojn de Esperanto.

(5) Inter la junularo :

Dum la milito Skolta Esperantista Ligo perdis multajn agemajn kolegojn, sed jam denove viglas multaj sekcioj kaj la Ligo havas perantojn en 15 landoj. Reciprokaj vizitoj estas oftaj kaj persona korespondado internacia estas tre vigla. Dum la jaro aperis regule *La Skolta Mondo* kiu servas kiel utila kontaktilo. En Parizo la skoltoj aranĝis renkontiĝon dum la 35-a U.K., kaj tio evoluis laŭ la tradicia maniero—tendeja apudfajra kunveno kun kantoj, k.s. Okazis krome kunsido kun raportoj, diskutoj k.a. La kunveno de T.J.O. en Konstanz estis granda sukceso, kun 500 partoprenantoj el 17 landoj. Tiuj vizitoj estas grava kaj impona fazo de la junulara agado kaj ĉiam havas bonan efikon. En **Danlando** fondiĝis Esperantista studenta klubo en Kopenhago, kiu serĉas kontaktojn kun similaj rondoj en aliaj landoj.

(6) En sporto :

Bone konata franca atleto, Marcel Rouet, donis la jenan konsilon al la franca junularo: “Ni havas fratojn en aliaj landoj. Do estas necese, ke vi lernu internacian lingvon.” En sia revuo *Apollon* li ĵus aperigis artikolon favoran al Esperanto, sub la titolo *Esperanto kaj Kultivismo*. Espereble la alvoko atingos la orelojn de kelkaj partoprenontoj en la Olimpiado de 1952.

El la kunsido de la Unua Sekcio ni povas konkludi, ke kvankam la progreso de nia movado en junulaj rondoj estas videbla kaj en kelkaj lokoj tre kuraĝiga, tamen multe da laboro restas farinda kaj farenda.

(Resumo laŭ raporto de D. Kennedy
Prez. de Unua Sekcio)

Dua Sekcio : Scienco kaj Tekniko

Rezolucio

La II-a Sekcio de la 35-a Universala Kongreso de Esperanto, kies laborojn partoprenis 123 delegitoj, reprezentantaj diversajn fakojn de la scienco kaj tekniko, rajtigitaj de landaj kaj fakaj asocioj el 34 ŝtatoj, post detala esploro pri la rezultoj atingitaj sur kampo de praktika utiligo de la Internacia Lingvo por la celoj de la scienco kaj tekniko,

konstatas :

1. La universaleco de la scienco urĝe bezonas unikan sciencon lingvon. Tiu lingvo povas esti nur la neŭtrala, laŭ siaj elementoj vere internacia, lingvo Esperanto.

2. Post la konferenco pri la uzo de Esperanto en la sciencoj puraj kaj aplikataj, okazinta en Parizo en la j.1925, same kiel post la Internacia Konferenco *Esperanto en la moderna vivo* okazinta en Parizo en la j.1937, grandiganta nombro da sciencistoj kaj teknikistoj aperigas konsiderindan nombron da sciencaj verkoj en Esperanto. Al pluraj nacilingvaj sciencaj verkoj estis aldonitaj resumoj en la Internacia Lingvo. Kelkaj sciencaj kaj fakaj revuoj aperadis kaj nun aperas en la Internacia Lingvo, dum aliaj esperantlingvaj revuoj ofte publikigas sciencajn aŭ popular-sciencajn artikolojn. Ĉirkaŭ 110 fakaj terminaroj pri ĉ. 50 diversaj sciencaj kaj teknikaj branĉoj estis ĝis nun publikigitaj en Esperanto, dum deko da aliaj fakterminaroj estas nun preparataj.

3. Tiu tuta laboro estis kaj estas farata sen ia ajn menciinda subteno fare de oficialaj naciaj aŭ internaciaj organismoj kaj tial ĝiaj rezultoj povas esti konsiderataj kiel tre kontentigaj.

Tamen la Internacia Lingvo ne estas ankoraŭ tiom kaj tiel utiligata por sciencaj celoj, kiom kaj kiel ĝi povus. Por atingi en relative mallonga tempo pli vastan uzadon de Esperanto en la scienco kaj tekniko, la sekcio

decidas :

1. Direkti alvokon al ĉiuj sciencistoj de la mondo, por ke ili dediĉu la merititan atenton al Esperanto kiel taŭga lingvo por la scienco kaj tekniko kaj kiel sola justa kaj praktika solvo de la nuna lingva haoso.

2. Rekomendi al ĉiuj sciencistoj sekvi la ekzemplon de la japanaj sciencistoj kaj teknikistoj, el kiuj ĝis nun 85 promesis publikigi en Esperanto almenaŭ po unu el ĉiujare verkotaj disertacioj kaj laŭ ebleco aldoni al la nacilingve skribotaj verkoj esperantlingvajn resumojn.

3. Rekomendi al Universala Esperanto-Asocio, ke ĝi, pere de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj de ĝiaj landaj sekcioj, aŭ pere de siaj membroj sciencistoj en diversaj landoj, entreprenu kampanjon inter sciencistoj kaj teknikistoj, por ke ili faru la saman promeson, kiun faris la japanaj sciencistoj.

4. Esprimi sian simpatian al la japanaj gekolegoj pro la laboro, kiun ili faris kaj faras sur tiu ĉi kampo.

5. Rekomendi al U.E.A., ke pere de I.S.A.E. kaj de ĝiaj landaj sekcioj, aŭ pere de siaj membroj sciencistoj en diversaj landoj, entrepreni grandskalan enketon inter la universitataj profesoroj kaj la aliaj sciencistoj por ke la sekcio povu dum sia sekva kunveno en la j.1951 havi klaran bildon pri la nacilingvaj verkoj, kies valoro kaj universaleco aparte postulus, ke ili estu tradukitaj en Esperanton. Surbaze de la enketo-rezultoj la sekva kunveno de la Sekcio esploros la eblecon realigi la sugeston de Prof. Bernard Lavergne de la Pariza Jura Fakultato, ke ĉiu ŝtato devigu sin eldoni ĉiujare po 50 plej valoraj verkoj en esperantlingva traduko.

6. Rekomendi al ĉiuj verkantoj de fakterminaroj interkonsiliĝi kun samfakuloj el diversaj landoj por atingi kiom eble plej grandan internaciecon. Antaŭ la publikigo de iu fakvortaro la verkinto(j) nepre submetu ĝin por aprobo al la Akademio. Laŭ ebleco oni publikigu antaŭ ĉio fakterminarojn por tiuj branĉoj de la scienco kaj tekniko, kiuj estas jam ellaboritaj en la nacia aŭ naciaj lingvoj fare de kompetentaj naciaj aŭ internaciaj fakaj organizaĵoj. Estas konsilinde doni difinojn aŭ priskribojn de la unuopaj terminoj.

7. Rekomendi al la Akademio de Esperanto plivigligi la laboron de la Sekcio pri la Teknikaj Terminaroj.

8. Peti ĉiujn sciencistojn kaj ĉiujn intelektulojn subteni per grandskalaj abonoj la esperantlingvajn sciencajn revuojn, antaŭ ĉio la organon de I.S.A.E. *Scienca Revuo*.

9. Rekomendi al U.E.A. daŭrigi kaj plivastigi la funkciadon de la Internacia Somera Universitato, kies rolo por popularigo de la scienco, arto kaj tekniko estas rimarkinda. U.E.A. klopodu ĉiujare eldoni la jarlibron de la I.S.U. kun la lekcioj faritaj en la pasinta laborperiodo.

10. Rekomendi al ĉiuj sciencistoj kaj teknikistoj, kiuj mem spertis la valoron de Esperanto por

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)

Tria Sekcio :

Internaciaj Intelektaj Interŝanĝoj

Konkludoj

(a) Pri la Beletristika Fakoj :

Ni konstatas, ke malfavoras al Esperanto kelkaj intelektulaj medioj precipe pro tio, ke la Esperantistoj mem ne scias la valorojn de sia propra literaturo. Tial necesas du ĉefaj specoj de propagando :

1. Interna Propagando : Ni konsilas :—

- (a) ke U.E.A. okazigu Literaturan Vesperon en ĉiu U.K.
- (b) ke U.E.A. rilatu kun eksport-agentejo en Hungarujo por havigi al la tutmondaj Esperantistoj la verkojn el la stoko de *Literatura Mondo*.
- (c) ke U.E.A. publikigu la plej bonajn verkojn originalajn kaj trakukajn en la kadro de aŭ *Beletra Suplemento* al *Esperanto* aŭ ĉiujara *Literatura Almanako*.

2. Ekstera Propagando :

- (a) U.E.A. diskonigu kaj disvastigu la iniciaton de la itala asocio kiu tradukigas per modernaj literaturistoj la plej bonajn poemojn de la Esperantaj poetoj kaj aperigas ilin en nacilingva revuo.
- (b) Diskonigu al la modernaj medioj la avantaĝojn kiujn la kritikistoj povas trovi en la Esperantaj antologioj por pli bone ŝati la valoron de la *malgrandaj* literaturoj.

(b) Pri bibliotekoj :

Grava estas la ekzisto de riĉaj klubaj bibliotekoj,

kiuj efektive funkciigas pruntedonojn al la grupanoj ; sed ne malpli grave, ke publikaj bibliotekoj disponigas Esperantlingvajn verkojn. Dezirinde estas se eble kunligi teknike por publika pruntepreno la grupajn kaj publikajn bibliotekojn. Krome oni klopodu eldoni tutlandajn katalogojn. Se eble oni influu la elekton de libroj por la publikaj bibliotekoj.

(c) Teatro :

- 1. Valora rimedo al la instruado de Esperanto estas la teatro. En grupoj, kie ankoraŭ ne ekzistas teatra fakoj, oni klopodu fondi tian.
- 2. Necesas al tiaj fakoj (a) ke ili facile kaj moderkoste havigu al si teatraĵajn tekstojn. Tiucele U.E.A. starigu centran teatran bibliotekon, kiu pruntedonos librojn al Esperantistaj aktoroj en ĉiuj landoj (b) ke ili konu la lingvon specialan de sia profesio. Tiucele, U.E.A. aperigu kiel duan parton de sia jarlibro teatran terminaron.

(ĉ) Kino :

Filmo montriĝis unu el la plej taŭgaj edukiloj kaj esence ĝi estas universala. La kunsido tial proponas,

- 1. Influi al ekzistantaj filmkompanioj por atingi aperigon de plurlingvaj filmoj, ne nur propagandaj, sed kiel eble humanaj, kulturaj,
- 2. Se eble la Esperantistoj per propra iniciato eldonu filmojn, ekzemple pri Vivo de Zamenhof, la Esperanto-movado, kaj Vivo

(daŭrigo de antaŭa paĝo)

la scienco kaj tekniko, atentigi pri tio siajn kolegojn per artikoloj kaj notoj en nacilingvaj sciencaj kaj fakaj revuoj, per prelegoj kaj laŭ alia konvena maniero.

11. Esprimi sian plenan aprobon al tiuj universitatoj, kiuj jam havas katedrojn de Esperanto, kaj rekomendi al ĉiuj universitatoj de la mondo enkonduki ankaŭ Esperanton en sian studprogramon.

12. Rekomendi al Internacia Scienca Asocio Esperantista fondi naciajn sekciojn en la landoj, kiuj ilin ankoraŭ ne havas, por realigi pli facilajn kontaktojn kun la sciencaj kaj teknikaj medioj de la koncernaj landoj.

13. Rekomendi al naciaj sekcioj de I.S.A.E. kaj al la landaj asocioj malfermi apartajn kursojn de Esperanto por sciencistoj, intelektuloj kaj

studentoj. Se iel eble, oni fondu apartajn grupojn de esperantistaj sciencistoj, aŭ intelektuloj, aŭ nur studentoj, precipe en la universitataj urboj.

14. Rekomendi al I.S.A.E. organizi bonan informservon pri ĉiuj verkoj, aperantaj en Esperanto, publikigante pri tio menciojn, notojn, aŭ recenzojn en *Scienca Revuo* aŭ alimaniere.

15. Alvoki ĉiujn personojn, kiuj praktikas aŭ simpatias la Internacion Lingvon, subteni morale kaj materie la klopodojn farotajn por pli vasta utiligo de Esperanto por sciencaj celoj. La sciencaj kaj fakaj nacilingvaj revuoj estas aparte petataj publikigi tiun ĉi rezolucion.

En Parizo, la 10-an de Aŭgusto 1950.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Prezidanto de la II-a Sekcio (Scienco kaj Tekniko)

de la Esperantistoj. Kelkaj povus servi kiel enkondukaj aŭ intermitaj filmetoj en kinejoj.

(d) Radio :

1. Radio-dissendoj en Esperanto valoras ne nur kiel propagando inter la ĝenerala publiko, sed ankaŭ kiel grava medio de la kulturo Esperantista. Tial estu pli intimaj rilatoj inter la dissendantoj kaj la aŭdantaro. Ni rekomendas :—

(a) ke grupoj rilatu kun radio-stacioj, kiuj antaŭ ne longe ĉesis dissendi Esperantajn programojn, por efektivigi ties rekomencon,

(b) ke ĉiuj Esperantaj radio - stacioj pligrandigu la nombron de artaj programoj.

2. La aplikado de Esperanto estas tute dezirinda por amatoraj radio-dissendoj, almenaŭ en landoj kie tion permesas la naciaj instancoj. Ni konsilas la fondon de faka asocio de Esperantistaj Amator-Dissendantoj, kiuj uzu Esperanton por sia kodo.

(e) Plastikaj artoj :

Komuna posedaĵo de la homaro estas muziko kaj plastikaj artoj. La kunsido konsilas

1. Doni pli la spaco en revuoj por tiuj fakoj,
2. Se eble eldoni apartan artrevuon tiel atingante bezonatan evoluon de priarta terminaro,
3. Migrantaj ekspozicioj, kiel tiu de infan-desegnaĵoj el Lyon, estas tre rekomendindaj, kaj se eble la U.K. mem prezentu artaĵojn el Esperantaj medioj de la tuta mondo,
4. Venis la momento por restarigo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kiujn rajtu partopreni ne nur kongresanoj, sed aliaj per sendo de artaĵoj, ekzemple kontraŭ speciala konkurskotizo.

(f) Homaranismo :

Prezentante siajn konkludojn pri humanismo, la kunsido deziras emfazi, ke la Esperantista movado konstante konservu sian neŭtralecon kaj toleremon, kiujn ni konsideras esencaj al la Esperanta ideo. Ni konsilas antaŭ ĉio, ke la juna generacio komprenu la altan idealan valoron de Esperanto kaj ke oni pliampleksigu inter-korespondadon inter diverslandaj infanoj pere de nia lingvo. Eĉ kelkafoje oni povus organizi korespondon inter infanoj, kiuj ankoraŭ ne konas nian lingvon, pere de Esperanto ĉar tio incitus la infanojn lerni la lingvon por korespondi senpere.

Gen. L. Bastien, Prez. de la Tria Sekcio



Kvara Sekcio : Internacia Trafiko kaj Komerco Konkludoj

Konsekvence de la debatoj de la 7-a aŭgusto la 4-a Sekcio deziresprimas :

1. Ke oni celu uzon de Esperanto ĉe la giĉetoj de la diversaj servoj de la trafiko : Bankoj, poŝtoj, telegrafoj, telefonoj, fervojoj, aerhavenoj, ŝipagentejoj, doganoj k.t.p., t.e. tie, kie la vojaĝanta publiko bezonas servojn kaj informojn ; pro tio agadon

(a) ĉe la personaro,

(b) ĉe la administracioj,

montrante al ambaŭ la neceson de Esperanto en la universala trafiko ;

2. Ke la internaciaj trafikaj dokumentoj estu redaktataj nur nacilingve (en lingvo aŭ lingvoj de la originala lando) kaj Esperante, laŭ la raporto de Sinjoro Bormann ; pro tio, agadon ĉe la registaroj kaj ŝtat-privataj administrantoj.

La 4-a Sekcio konstatas, ke tiuj celoj estos trafataj nur dank' al organizado de la Esperantomovado sur fakkampo.

La fakigo de la laboro devas esti sufiĉe granda kaj samtempe sufiĉe kunordigata por permesi interhelpon. Necesas trovi la nunan ekvilibron inter sufiĉe da ereco kaj sufiĉe da areco. Tiu ĉi ekvilibro nuna ŝajnas esti fakigado de la diversaj partoj de la trafiko :

(a) oficistoj de la komunikaj kaj transportaj servoj (arigitaj en ILEPTT),

(b) uzantoj de tiuj servoj (komercistoj, turismoj, bankoj, asekuroj),

(c) gardaj servoj de la ŝtatoj (polico, dogano).

Kunagadon de ĉiuj por eldoni komunan, gravan, seriozan revuon.

La Kvara Sekcio fine konsentas pri la disvolviĝo de Esperanto en Turismo, kaj resendas al komisiono la studon de la Jarlibra demando kun la celo plifaciligi la U.E.A.-agadon.

P. Petit, Prez. de la Kvara Sekcio

P. H. Mooy :

La Somera Universitato



La celo de la Somera Universitato ĝenerale estas, popularigi sciencajn temojn, prefere tiujn, kiuj en la lasta tempo ofte estas pridiskutataj. Por la Esperantistoj ĝi tamen havas ankoraŭ kromcelon. Pere de ĝi ni nome povas montri al la publiko la uzeblecon de nia lingvo por la plej malsamaj temoj. Estas tial ĝojiga fakto, ke pli kaj pli da scienculoj komencas interesiĝi pri Esperanto, kaj ke tiel la kongreskomitato povas variigi la programojn. Ankaŭ por la ĵus finiĝinta kongreso la komitato sukcesis kunigi ok scienculojn, kies nomoj jam antaŭe garantiis interesajn prelegojn.

Anoncitaj estis la sekvantaj programeroj :

1. La *Serumo* pri vereco : D-ro Giorgio Canuto, Parma, Italujo.
2. La jura signifo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj : Prof. D-ro Ivo Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo.
3. Pri Fiziko : Ĉu oni povas vidi atomojn ? : D-ro Hugo Sirk, Vieno, Aŭstrujo.
4. Evolufazoj de la Mondekonomio : Prof. Lucien Laurat, Parizo, Francujo.
5. La Internaciaj Poeziaj Formoj : Prof. Gaston Waringhien, Parizo, Francujo.
6. Pri statistikaj miskomprenoj : D-ro Olaf Reiersöl, Oslo, Norvegujo.
7. Aspektoj de la demando pri prefero kaj aplikado de koloroj : D-ro W. J. Nijveld, Amsterdam, Nederlando.
8. La problemo de Hamleto : Mag. Reto Rossetti, Troon, Skotlando.

Pri manko de diverseco de la elektitaj temoj oni do ne bezonas plendi. Tamen la celo de la organizintoj ne estus atingita, se la kongresanoj ne estus montrintaj interesiĝon. Ke tio ne ĉiam dependas de la preleganto kaj de la temo evidentiĝis el la vortoj de Prof. Waringhien, kiu en sia malferma parolado rakontis, ke en 1932 S-ro Kalocsay nur povis altiri dek aŭskultantojn. La unuan kunsidon en ĉi tiu jaro ĉeestis nombro da kongresanoj, kiu sendube ne multe diferencis de kvincent. Tiu granda nombro pruvas, ke

multaj kongresanoj ne venis al Parizo nur por tie ĝui kelkajn amuzajn tagojn, sed ke ili alte taksis la strebon de la komitato plialtigi la nivelon de la kongresoj. Vere la komitato ne povas ne esti kontenta pri la akirita sukceso. Kvankam ne ĉiuj prelegoj altiris tiom grandan aŭskultantaron, kiom la unua kunsido, la nombro da ĉeestantoj ĉiam estis kontentiga kaj certe stimulos estontajn komitatojn, daŭrigi la laboron laŭ la sama maniero.

En la malgranda amplekso de ĉi tiu raporto mi kompreneble ne povas doni resumon de ĉiuj prelegoj aparte (eĉ resumoj en la kongreslibro superus la disponeblan spacon), kaj mi ne volas doni preferon al iu ajn, kio cetere nur donus mian personan guston. Ni aŭdis scienculojn el sep diversaj landoj, sed kiu ajn parolis, la prelegintoj ĉiam sciis absorbi la plenan atenton de la aŭskultantaro. La tasko de la prelegintoj estis malfacila, ĉar ofte evidentiĝis, ke ili pro manko de tempo nepre devis ellasi aferojn, kiuj certe estis ne malpli interesaj ol tiuj, kiujn ili povis elparoli, sed ilia laboro ankaŭ estis plene rekompencata per la streĉa atento de la ĉeestantoj kaj per ties laŭta aplaŭdo.

Grava fakto por la sukceso de la Somera Universitato estis ankaŭ, ke la kongreskomitato sciis ĝin aranĝi tiel, ke neniam samtempe kun ĝi okazis alia grava kunveno aŭ iu ekskurso. Se estontaj komitatoj scios fiksi sammaniere siajn programojn, ili povos esti certaj pri sukceso. Ankaŭ la kvanto da prelegoj estis ĝuste sufiĉa. Inter ok prelegoj ĉiu povas trovi ion laŭ sia gusto, kaj por tiuj, kiuj nepre volas aŭskulti ĉiujn, ok certe estas la maksimumo konsumebla. Resume mi do povas diri, ke tiel la aranĝinta komitato, kiel la aŭskultintoj povas esti tute kontentaj pro la akirita sukceso.



Penseroj senpretendaj

Ĉiu aktiveco, kiu fariĝas laboro, iĝas enuiga !

* * *

Ne plenumu ion hodiaŭ, se morgaŭ estos ankoraŭ tempo !

* * *

Ju pli grava estas afero, des pli serene traktu ĝin !

* * *

Amuzado de riĉulo estas distraĵo ; amuzo de salajrulo diboĉo !

Georges Agricola.

W. A. Gething :

Post Laboro La Plezuro



La ŭ *Plena Vortaro*, *distri* signifas *deturni la spiriton de ĝiaj prizorgoj, agrable okupante, amuzante ĝin*, kaj laŭ tiu difino la Kongresanaro distribuis sin dum la tuta semajno, krom dum la laborkunsidoj. Fakte, la tuta kongresprogramo estis tiel interesriĉa, kaj la allogaĵoj de Parizo tiom evidantaj, ke estas

vere mirinde (kaj gratulinde) ke tiom da fervoruloj ĉeestis la laborkunsidojn kaj la Someran Universitaton. Se troviĝas kongresano, kiu ne bone amuziĝis kaj agrable okupiĝis dum la tuta semajno li (aŭ ŝi) devus tuj viziti psiko-analiziston!

Mi iris al Parizo kun kajero kaj kraĵono kaj forta decido, ke mi serioze plenumos mian promeson raporti pri la distra flanko de la kongreso, sed ĉiufoje la okazaĵoj tiom distribuis min, ke mi forgesis la kraĵonon!

Tial mi nun trarigardas la Kongreslibron kaj per ĝi instigas la memoron. Jen kredeble la plej bona metodo, ĉar spaco mankas por priskribi ĉion kaj mencii ĉiun; kaj kvankam mi povas sincere kaj honeste diri, ke nenio kaj neniu malplaĉis al mi dum la Kongreso, evidente—laŭ miaj personaj gusto kaj prefero—iuj aferoj pli forte impresis min ol aliaj, kaj tiel pli facile revenas al la memoro.

* * * *

La sperto pruvis, ke S-ro Warnier pravis, kiam li konsilis la aranĝon de la Balo frue dum la Kongreso (t.e. mardon). Ĝi provizis la okazon finsigeli en plej feliĉaj cirkonstancoj la amikajn rilatojn, kiujn oni faris aŭ renovigis dum la komencaj tagoj. La Balo okazis en la grandaj kaj belaj salonoj de Hotel Continental kaj la bezonataj ingrediencoj por certigi sukceson abundis, nome, bonega dancpargeto, gaja kaj plej kompetenta dancorkestro kaj amaso da belaspektaj, belvestitaj gesinjoroj, kiuj tre evidente decidis jam de la komenco ĝui la vesperon . . . kaj la matenon (ĉar oni dancis ĝis la 5-a!). Je noktomezo oni aranĝis ceremonian paradmarŝon por la portantoj de naciaj kostumoj kaj ili provizis veran feston por la okuloj.

Por taŭge priskribi la Kabaretan Vesperon, aranĝitan de la Parizaj Koboldoj oni bezonus plurajn paĝojn, do mi devas kontentigi min (kaj eble malkontentigi la artistojn) per kelkfraza resumo. Kompreneble la genia kaj bonhumora Raymond Schwartz estris la aferon kaj en la malgranda *Salle Adyar* li estris kaj bonhumorigis ankaŭ la aŭdantaron mem. La programo estis riĉa kaj longedaŭra, kaj ĉiu artisto meritis, kaj ricevis, aplaŭdon. Kio plej plaĉis al mi (kaj ci tie kompreneble mi esprimas nur la propran opinion) estis la kortuŝe artriĉa kantado de la Tri Kolumbinoj. Jen kombinaĵo de *Kolumbinoj* kiu kaptis ĉies koron! Ankaŭ Marga Rineta tre verve kaj gaje, kaj Marguerite Santreuil tre ĉarme, kantis, kaj Marc Darnault majstre deklamis poeziaĵojn.

La Koboldoj prezentis por la dua parto de sia programo originalan revuon, verkitan de Schwartz *Tra L'Am-Ondo!* kies ok scenetoj abundis je sprita bonhumoro. Precipe menciinda estis la sceneto *Pac-Konferenco* dum kiu *Jozefo* (en ruĝa ĉemizo kaj pendaj lipharoj) konkuris kun *Harry* (en Usona kostumo) pri disvendo de Paco.

La Varietea Vespero en la grandega *Salle Pleyel* disvolviĝis en vere profesia maniero kaj mi sincere gratulas la program-aranĝintojn, la direktintojn kaj la artistojn. Grupo de belaspektaj kaj pitoreske vestitaj gejunuloj el la Sveda urbo Skara popoldancis en plej ĉarma maniero, kaj poste kvin Svedaj sinjoroj, kiuj formas la muzikistaron *Sonoriloj de Paco* vere mirigis nin per sia lerta ludo de arioj je ne malpli ol 163 sonoriloj!

Je mia granda plezuro la Tri Kolumbinoj denove kantis (kaj mi volonte aŭdus ilin multfoje) kaj Sinjorino Jelly Koopmans ĉarma Nederlanda Esperantistino, ne nur frapis niajn okulojn per sia belega kostumo, sed ankaŭ niajn orelojn per sia riĉa voĉo.

Parizanoj sub reĝisorado de Marc Darnault, prezentis la unuaktan komedion de Tristan Bernard *Angla Lingvo sen Profesoro* kaj nur ĉi tion mi diru, ke Marc Darnault mem brilis inter tuta kolekto de kompetentaj geaktoroj.

Nia rondforma ridvizaĝa amiko Dahl prezentis la artistojn kaj kaptis la okazon prezenti oreltiklan reformon de Esperanto, kiu kredeble ne ricevos la aprobon de la Akademio!

Pro premo de aferoj mi ne povis vidi la teatraĵon *Nokto de la Viroj* kiun prezentis Marc Darnault, sed sendube ankaŭ tio ricevis varman akcepton ĉar Darnault estas vera artisto en sia profesio.

Ferma Kunsido

Rapide la kongresa semajno pasis. Tro da impresoj, tro da allogaĵoj lacigas kaj Parizo neniel estas la loko por ripozo. Ĉio en la vivo finiĝas, ankaŭ la plej bela kongreso. Sabaton matene je la deka pleniĝas la Amfiteatro per homoj parolantaj unu lingvon.

Prezidanto Warnier malfermas la kunsidon. La Komitato de U.E.A. estas kompleta. Ĉeestas la reprezentantoj de UNESCO kaj de francaj ministerioj. La prezidanto esprimas sinceran dankon de la Esperantistoj al la aŭtoritatuloj—ŝtataj, urbaj kaj universitataj—kiuj faciligis al la organizantoj la taskojn. Apartan dankon ni ŝuldas al la personaro de la Sorbono, kiu dediĉis siajn liberajn horojn al la kongreso kaj ĉiam servopreta kaj helpema plenumis ŝian laboron. (*Forta kaj longa aplaŭdo*).

Estas la vico de la raportado pri la laboroj de la Kongreso. Ĝin plenumas la Vicprezidanto de U.E.A., D-ro P. Kempeneers. Unue pri la laboroj de la Komitato kaj de la Estraro de U.E.A. kiuj kunvenis ĉiutage kaj kunsidis ne malpli ol 21 horojn (komitato) kaj 14 horojn (estraro), kune 35 horojn por la Estraranoj sen kalkulo pri apartaj kunsidoj por fini iun aferon, dum kiuj la ceteraj kongresanoj ĝuis la kongreson.

La trijara oficperiodo finiĝis. La nova komitato konsistas el 27 anoj de kategorio A (proponitaj de la Landaj Asocioj), 4 de la kategorio B (elektitaj de la Delegitoj), kaj 4 (alelektitaj de la 31 komitatanoj A kaj B). La kompleta listo aperos en la Dua Parto de la Jarlibro 1950.

Pro ekonomiaj kaŭzoj la Komitato de U.E.A. decidis malgrandigi la nombron de la anoj de la Estraro ĝis kvin. Ĝi nun konsistas el: Prezidanto: S-ro Ernfrid Malmgren (*ĝeneralaj aferoj kaj rilatoj kun Landaj Asocioj*); Vicprezidanto: D-ro P. Kempeneers (*intelektaj kaj kulturaj aferoj, kaj Fakaj Asocioj*); Estraranoj: S-ro Hans Jakob (*ĉiuj publikigaĵoj de U.E.A., Biblioteko kaj Servoj*); Prof. D-ro I. Lapenna (*propagando ĝenerala, la Kongresoj, kaj juraj problemoj*); S-ro A. C. Oliver (*financaj kaj administraj aferoj, kaj Propagando de U.E.A.*).

Ĉiu Estrarano okupos sin pri la cititaj sekcioj laŭ la Statuto kaj laŭ la decidoj de la Komitato.

La prezidanto de U.E.A. varme dankas al S-ro Kennedy eksiganta, pro lia kunlaboro persista kaj lia trankviliga influo en kelkfoje komplikaj diskutoj. S-ro Kennedy transprenas de nun la gvidon de la instruaj kaj pedagogiaj aferoj, kiel komisiito de la Estraro.

Estas kutimo de tempo al tempo danke memori ne nur la mortintojn sed ankaŭ la vivantojn.

Movado batalanta por akceptigi siajn ideojn neniam posedas la rimedojn financajn por konkretigi tian dankesprimon per ia honordono. Mi diras *dono*, sed ne *donaco*, kiu estas io alia. U.E.A., kiu ne troviĝas en la situacio plenumi tian signifan de dankemo, povas konsenti la Honoran Membrecon. Nunjare la Komitato proponis al la Kongreso tri kandidatojn je tiu ĉi honoro:

Sinjorino Wanda Zamenhof, bofilino de la kreinto de Esperanto,

Sinjoro Antonio Caetano Coutinho, brazila pioniro de Esperanto,

Sinjoro Kenji Ossaka, meritplena pioniro japana

Senhalta aplaŭdo pravigis la proponon de la Komitato de U.E.A. Estis decidite krome sendi telegramon al S-ro Zamenhof, ne povinta veni al la nunjara kongreso.

Post tiu ĉi solena momento la aferoj estas daŭrigataj. Sekvas informoj pri la Gazetara Servo, pri la Petskribo kaj ĝia transdono al UN en Lake Success per D-ro Solzbacher (pri tio legu aliloke), kaj la raportanto, D-ro Kempeneers fine atentigas, ke la rolo de Komitatano de U.E.A. **ne** estas io purformala, simpla plenumo de statuta regularo **sed** signifas partoprenon ne nur personan, sed aktivan en la kunvenoj kaj laboroj. Kelkaj Komitatanoj, supozeble pro la ĉarmoj de Parizo ne trovis la kunvenejon. Elektito, kiu konstatas, ke li ne povas plenumi la laborojn laŭstatutajn de Komitatano, prefere konigu tion. Sincereco antaŭ ĉio.

Raportas nun D-ro Lapenna pri la Oratora Konkurso. Ricevis premiojn:



A. Albault

1. **S-ro André Albault** (Franco) kun 36 poentoj,

2. **S-ro N. R. Smith** (Anglo Sekr. de Londona Klubo) kun 30 poentoj.

3. **S-ro W. G. Atkinson** (Anglo) kun 28 poentoj.

La gajnintoj de la Literatura Konkurso estas:

Originala poezio

1. **D-ro Vicente Musella** (Italo).

2. **S-ro Reto Rossetti** (Sviso-Anglo)

3. **S-ro Pastro John Dinwoodie** (Skoto)

Tradukita poezio

1. **S-ro Reto Rossetti**

2. (*dividita*) **S-ro A. D. Foote** (Anglo)

S-ro B. Vanĉik (Jugoslavo)

La juĝantaro de la Literatura Konkurso konsistis el samideanoj Waringhien, Isbrucker, Alexandersson, Laurat kaj Sturmer.

La premiitoj estas alvokitaj kaj danke kliniĝas antaŭ la kongresanaro (aplaŭdo).

(Rimarko de la raportanto: Estontece oni devus antaŭe kunigi la premiitojn, loki ilin apud aŭ sur la podion, kun tablo kovrita per flago kaj iom ornamita. Tiaj ceremonioj devas esti pli bone aranĝataj. La tono faras la muzikon!).

Rezulto de la sportludoj
en la 35-a

I. Teniso

1. S-ino Allis (angla)
2. S-ro Clavel (franca)

II. Kurado

1. S-ro Larsen (dana)
2. S-ro Olejniczak (pola)
3. S-ro Lewis (angla)
4. S-ro Denis (franca)
5. S-ro Van Goils (nederlanda)

III. Saltado

1. S-ro Larsen (dana)
2. S-ro Lewis (angla)
3. S-ro Van Goils (nederlanda)
4. S-ro Tabernat (franca)

IV. Naĝado

1. S-ro J. Corbett (angla)
2. S-ro Tabernat (franca)
3. S-ro Lewis (angla)
4. S-ro Guillaume (franca)
5. S-ro Van Goils (nederlanda)

La prezidanto de U.E.A. submetas al la Kongreso por aprobo la jenan tekston de rezolucio:

“La 35-a Universala Kongreso de Esperanto okazanta de la 5-a ĝis la 12-a de Aŭgusto 1950 en Parizo, kiun partoprenas 2300 reprezentantoj el 35 landoj, akceptis jenan

REZOLUCION

La Internacia Lingvo—estante ne nur taknika rimedo de pensado kaj komunikado, sed ankaŭ potenca instrumento de proksimigo de la homoj en la mondaj kadroj—estas esence ligita al tutmonda paco kaj al amikecaj rilatoj inter la popoloj.

Tial la 35-a Kongreso de Esperanto forte subtenas ĉiujn sincerajn klopodojn por sekurigi la

pacon kaj atendas, ke ĉiuj pacamantoj dediĉos la merititan atenton al la Internacia Lingvo, la grava antaŭiganto de internacia solidareco.”

La rezolucio estas akceptita sen kontraŭstaro kun vigla aprobo permana.

Oni jam sentas la venon de la fino de la kongreso. Devus nun veni la tradicia invito al la nova kongresloko. Pro neebleco de la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, D-ro Siegfried Ziegler, ĉeesti (laŭdire pro nericevo de la vizo!) **S-ino Greta Kraft** suriras la podion kaj komunikas la inviton faritan de la Landa Registaro Bavara, kiel ankaŭ de la Urbestro de München, gastigi la 36-an. Ŝi krome konigas diversajn faciligojn. La kongreso sen ia kontraŭstaro kaj sub senrezerva aplaŭdo akceptas la inviton kaj esprimas per tio la fidon al la germanaj Esperantistoj kunlabori laŭ la spirito, kiu nin gvidas.

Ekprenas la parolon S-ro Warnier por esprimi la tradiciajn dankojn al ĉiuj, kiuj laboris kun la Loka Kongresa Komitato por certigi la sukceson de la kongreso. Li unue dankas al la kongresanoj, kiuj per disciplina obeo al la informoj de la L.K.K. kaj per frua aliĝo grandmezure kontribuis al la regula plenumo de la laboroj. Li dankas al la estro de la bufedo en la Sorbono kaj Hotelo Continental pro la bona servado kaj — ne forgesinde—prezoj moderaĵ; al la Ĝenerala Direktoro de *Galleries Lafayette* S-ro Raoul Meyer, afable invitinta la kongreson por la dua fojo je teo kaj ceteraj agrablaĵoj sur la teraso-ĝardeno de tiu grandega magazeno mondkonata.

Prezidanto Malmgren siavice esprimas plej koran dankon al la Loka Kongresa Komitato, antaŭ ĉio, al ties prezidanto kaj ĝenerala sekretario **S-ro G. Warnier** kaj **S-ro J. Couteaux**, kiel ankaŭ al sekretario **O. T. Nicolaisen** pro la sindona plenumo de akceptita tasko. Ne estas facile organizi dum somero en mondurbo tian manifestacion. Ni rekonu danke la bonegan servadon faritan. Li dankas al la laborantoj de la bone funkciinta *Gazetara Servo*, kiu per regulaj informoj provizis la aktivulojn per tuj uzebla materialo. En tiu rilato S-ro Malmgren volas esprimi sinceran dankon pro la grandega kaj nekalkulebla servo farita ne nur al la *Gazetara Servo*, sed ankaŭ al la kongreso de la firma **Underwood**, kiu pruntis dek skribmaŝinojn kaj multobligan maŝinon tute senpage. Nia danko iras ankaŭ al **S-ro Remond**, **Sinjinoro Lapenna** kaj **F-ino Huguette Royer**, simpatiaj laborantoj. Al ĉiuj ceteraj helpantoj, la nekonataj soldatoj de la paca armeo, koregan dankon!

Apartan dankon oni ŝuldas al la aranĝanto de la Internacia Somera Universitato, **Profesoro G. Waringhien**. La neatendite multenombra vizito

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)

Basil McGrath :

Impresoj pri la 35-a



Antaŭ ĉio la U.K. en Parizo estis granda manifestacio de digno. Ĉiuj kunsidoj okazis en la Sorbono, la sidejo de la Pariza Universitato kaj estis en tiu atmosfero de klereco, ke la verda familio ankoraŭ unu fojon renkontiĝis.

Prof. D-ro

Lapenna en la dimanĉa Solena Malfermo en rimarkinda festparolo donis al la kongreso tonon de profunda prudento kaj homaranisma harmonio, kiu regis la tutan semajnon. La temo de **D-ro Lapenna** estis la Universalismo kaj ĝi konsistis en pasia pledo por la kreado de internacia solidareco bazita sur absoluta toleremo. “*Ni estu maltoleremaj nur kontraŭ la maltoleremo!*” li diris. Kia domaĝo, ke neniun ano de la Zamenhofa familio partoprenis por aŭskulti la parolon, ĉar tiu festparolo estis en la plej bona Zamenhofa tradicio.

La surestradaj paroloj atingis altan nivelon de klareco. Precipe mi permesas al mi menciigi la salutparolon de **S-ino D. Tappan Connor** dum la Solena Malfermo kaj la bonvenigan al München parolon de **S-ino Kraft** dum la Solena Fermo. Ambaŭ paroloj estis elokventaj kaj ili montris kiel dolĉe bela estas nia lingvo kiam bone parolata de samideaninoj.

(daŭrigo de antaŭa paĝo)

al la prelegoj malgraŭ la ekstreme granda varmo, kaj ni diru tion malkaŝe, malgraŭ la multenombraj allogaĵoj eksterkongresaj en Parizo, pruvas la valoron de la institucio de la I.S.U., kiel ankaŭ la valoron de la nunaj prelegoj kaj prelegantoj. (Parenteze, jam pasis 25 jaroj de kiam D-ro Privat instigis en Genève por la 17a kongreso la kompletigon de la kongreso per la prelegoj de Somera Universitato. Li certe ĝojas pri la belega evoluo de lia ideo).

D-ro Kempeneers, la ĉiam ridetanta vicprezidanto leviĝas kaj per belaj vortoj dankas al la prezidanto **S-ro Malmgren** kaj al la sekretario

Kun **S-ro P. Petit** kelkaj el ni faris viziton al la grava asekura firmo *La France* fondita antaŭ pli ol cent jaroj. Oni akceptis nin en la salono de la direktoroj kaj la Prezidanto de la direktoroj varme nin bonvenigis franclingve; sed granda surprizo sekvis, kiam unu el la direktoroj perfekte laŭtleĝis al ni en Esperanto klarigon pri la ĝenerala komerca agado de la kompanio. La vizito por mi estis vere interesa ĉar mi estas asekuristo, kaj mi multe ŝatas la donacon de arĝenta medalo al mi kiel memoraĵon.

En la ĝenerala kunsido ĵaŭdon ni aŭskultis kun fiero pri la laboro de niaj usonaj samideanoj en Lake Success. Oni ne povas ne admiri la manieron per kiu niaj transoceanaj amikoj faris sian eblon por dece altiri la atenton de la plej alta mondinstanco al nia lingvo.

La duan sinsekvantan jaron Franco venkis en la oratora konkurso. Li meritis sian sukceson pro preskaŭ perfekte farita parolo. La ĝenerala nivelo de oratoreco estis pli alta ol en Bournemouth, sed estis bedaŭrinde, ke nur kvin junuloj partoprenis la konkurson.

Kion diri pri la ordinara Esperantistoj en Parizo? Ankaŭ ili kondukis digne, ĉu en la Urbdomo, en Versailles, en *Galleries Lafayette*, ĉu surstrate, surtrajne. La kongreso verŝajne ne estis facile aranĝebla pro tio, ke Parizo estas tiel vasta urbo. Kiam okazis malagrablaĵoj la samideanoj unue plendetis sed tuj poste pardonis kaj forgesis.

Do, tia estis la kongreso 1950—laciga por ni ĉiuj pro la konstanta irado en varmega urbego, sed ĉiel digna.

de U.E.A. **S-ro Goldsmith** pro ilia dumjara kaj nuna laborego. Li sin turnas al la edzino de la prezidanto kaj dankas ŝin pro la pacienco montrita okaze de longedaŭraj aferkunvenoj. Ĉarma knabino, **F-ineto Ohana** el Maroko, transdonas al **Sinjinoro Malmgren** florbukedon.

Ĉu necesas diri, ke ĉio tio estas sekvata de forta aprobo de ĉiuj! Nu, la kongreso bone sukcesis kaj ni niavice esprimu nian dankon al tiuj, kiuj meritis tion.

Eksonas la himno kaj malrapide falas la granda flago super la podio . . . por vojaĝi al München.

Finiĝis la 35-a. Vivu la 36-a!

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Alexander al Ges-roj Ken kaj Naomi, en New Malden, Anglujo 30 julio 1950 filo **John Richard** (nepo por Montague C. Butler).

Brkiĉ al Ges-roj Dimo kaj Helga, en Ballarat, Aŭstralio 27 aprilo 1950 dua filo **Marcel** (frato de Goro).

Hoffmann al Ges-roj Ullrich kaj Eva, en Berlin-Neukölln, Germanujo, 11 majo 1950 filino **Eva**.

Tozer al Ges-roj W. en Aldershot, Anglujo 5 majo 1950 filo **Christopher Graham** (frato por Malcolm).

Fianĉiĝo

Lundkvist-v. Steenwijk, FD de U.E.A. S-ro Arne Lundkvist en Karlskrona, Svedlando, kun F-ino Mijntje v. Steenwijk en Rotterdam, Nederlando 26 julio 1950.

Geedziĝo

King-Guilliard, Del. de U.E.A. S-ro A. V. R. King kaj F-ino G. M. Guilliard en Bristol, Anglujo 20 majo 1950.

Datreveno

Christaller, Prof. Paul, festis le la 21-a de aŭgusto 1950 la naŭdekan datrevenon de la naskiĝo 21.8.1860. Niaj sinceraj gratuloj kaj bondeziroj iras al tiu ĉi nelacigebla pioniro de nia afero en Germanujo, sindona kaj senŝanceliĝa batalanto por paco kaj justeco.

Al ĉiuj la redakcio direktas plej sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

Niaj mortintoj

Ni eksciis kun bedaŭro pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj. Al iliaj parencoj ni direktas niajn plej profundajn kondolencojn.

Justesen D-ro P.Th., Honora Membro de C.D.E.L., Prezidanto de tiu Ligo 1937-1942. Forpasis 75-jara post operacio junio 1950 en Danlando.

Morris S-ino Alice V., vidvino de S-ro Dave Hennen Morris iama ambasadoro en Belgujo kaj ministro en Luksemburgo; mortis 15 aŭgusto en Bar Harbor, Usono, 75-jara. S-ino Morris estis Dumviva Membro de U.E.A. kaj estis konata kiel fondinto de I.A.L.A., organizaĵo por esploro de la internacilingva problemo. Ŝi multe interesiĝis pri Esperanto kaj bone parolis la lingvon. Ŝi havis apartan intereson pri la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj malavare subtenis tian faklaboron.

Ryan S-ro H., en West Wickham, Anglujo, 30 marto 1950.

Sbernini S-ro A., en Trieste, Italujo, 58-jara, 4 junio 1950.

Sing S-ino P., D.M. de U.E.A., D. de U.E.A. en diversaj lokoj en Svislando. Aliĝis al la movado antaŭ 40 jaroj. Mortis en Kreuzlingen 80-jara 14 julio 1950.

Zeegelaar S-ro Pieter, en Voorburg, Nederlando, 83-jara, 18 majo 1950. Pioniro de la movado en sia lando; gvidis kursojn antaŭ 45 jaroj.

ENIGMA KONKURSO

Gajnis la premiojn post kontrolo de la **47-a konkurso**: S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) 141 p., S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) 140p., F-ino A. C. Nilssen (Norv.) 139p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la **48-a konkurso**: F-ino N. Hanson (Brit.) 148p., S-ro B. S. Trier (Dan.) 147p., S-ro V. Marccone (Ital.) 145p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la **49-a konkurso**: S-ro Th. Sund (Norv.) 145p., S-ro A. Csáder (ĈSR) 144p., S-ro F. Jelenc (Alĝerio) 142p.

INTERNACIA KONKURSO 1950

Stato je la 31-a de Julio

	Poentoj	Kvoto	%
1. Hispanujo ..	1135	600	189.2
2. Maroko ..	430	250	172.0
3. Izraelo ..	310	250	124.0
4. Germanujo ..	2310	2000	115.5
5. Sud-Afriko ..	285	250	114.0
6. Aŭstrujo ..	795	700	113.6
7. Finnlando ..	1985	1800	110.3
8. Aŭstralio ..	970	900	107.8
9. Belgujo ..	2120	2000	106.0
10. Svedlando ..	5160	4900	105.3
11. Urugvajo ..	260	250	104.0
12. Francujo ..	5393	5200	103.7
13. Svislando ..	1335	1300	102.7
14. Italujo ..	1455	1450	100.3
15. Nederlando ..	4991	5100	97.9
16. Brazilo ..	2102	2200	95.5
17. Britujo ..	11480	12500	91.8
18. Danlando ..	2820	3100	91.0
19. Kanado ..	220	250	88.0
20. Nov-Zelando	741	850	87.2
21. Usono ..	2544	3100	82.1
22. Irlando ..	190	250	76.0
23. Argentino ..	755	1000	75.5
24. Hungarujo ..	915	1400	65.4
25. Norvegujo ..	910	1500	60.7
26. Islando ..	395	660	59.8
27. Pollando ..	1870	4650	40.2
28. Egiptujo ..	85	250	34.0

Interesa fakto rilate al ĉi tiu tabelo estas la strebado de la "malgrandaj" landoj, kiuj efektive multe klopodas pri plifortigado de nia movado. Ni volas aparte gratuli S-ron Apcher en Maroko, kiu preskaŭ sola laboregas por restarigi la movadon en sia lando. Rilate al kelkaj el la ceteraj landoj necesas memori, ke la baroj de transpagoj multe kontribuas al la nealtaj ciferoj. Ni admonas niajn samideanojn daŭrigi la klopodojn, kaj la membroj rigardos kun intereso ĉi tiun *termometron* de nia sanstato.

FERIAJ ARANĜOJ EN DANLANDO

La renkontiĝo en Helsingør bone sukcesis. Partoprenis ĉ. 130 personoj el 8 landoj. Ĉiuj kursanoj akiris bonegan lingvo-scion, kaj tute ĝuis la diversajn aranĝojn.

Jam de kelkaj jaroj oni aranĝas aŭtunajn kursojn feriajn en la Sporta Altlernejo de Vejle belega loko ĉe maro kaj arbaroj en tipe dana regiono. Ĉijare ili okazos de 15 ĝis 22 oktobro. Ĉiuj estas invitataj partopreni. Oni neniam forgesos tiun restadon inter diverslandaj gesamideanoj. Petu senpagan prospekton de: L. Friis, Ingemannsvej 9, AABYHØJ, Danlando.

KONGRESO EN NOVZELANDO

La 16-a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en la urbo Palmerston North, 27-31 decembro 1950. Salutojn adresu al S-ro J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, WELLINGTON E.3, Nov-Zelando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 229.

29-an de Julio 1950

NOVA PERANTO

Egiptujo

S-ro Nassif Isaac, P.K. 350, Cairo. Tel.: 94980.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz. FD (Laboristaj aferoj): L. Wiesleitner, Schönaugasse 62-III, Graz VI.**St. Polten.** D: J. Withalm, Schiessstattpromenade 17.**Wien.** D: O. Sinner, Schönbrunner-Allee 53, Wien XII.

Belgujo

Brussel-Vorst. VD: P. H. Mooij, 20 A Moliërelaan. Tel: 43.91.18.**Dendermonde.** D: G. Verhaegen, Nieuwe baan 9-a, Grembergen.**Gent.** FD (Sociaj leĝoj): A. Van de Velde, Henri Pirennelaan 25, Gentbrugge.**Kortrijk.** D: G. Debrouwere, Magdalenastraat 29. Tel: 216.54.**Leuven.** D: F. Piot, Diestsestraat 118. Tel: 233.41. FD (Juro): La D.**Mechelen.** FD (Instruado): F-ino M. Van de Werf, Dodoensstraat 50.**Rotselaar.** D: H. Boving, Hertshaag 26A.

Brazilo

Belo Horizonte. FD (Odontologio): J. Barros Moreira, str. Coromandel 277.**Perdoes.** (M.G.). FD (Farmacio): M. Domingues de Sá Fortes, Rua Beltrão Pereira 79.

Britujo

Gosforth. D: Sino D. Haig, 30 Oakfield Road, Newcastle-on-Tyne 3.

Finnlando

Joutseno. D: Ilpo Rinne, Pulp, Joutseno. Tel: 178.**Karvia.** D: Jussi Sive, Sara. Tel: Sara 10.

Germanujo

Bad Kohlgrub. FD (Katolikismo): L. Thalmaier, Pfarrhof. Tel: 0945225.**Hamburg.** D: W. Rusch, Barlachstr. 11, Hamburg-Harburg. Tel: 321003, et. 40.**Hannover.** FD (Inĝenieraj aferoj): H. Michling, Steinbergstr. 1, Hannover-Kirchrode. Tel: 27561, et. 9108.**Krefeld.** D: D-rino C. Spruch, Ostwall 52. FD (Pedagogio): La D.**Lobberich.** FD (Transporto): R. Gerwin, jr., Jahnstr. 58, Lobberich b. Krefeld. Tel: 393.**Schifferstadt.** D: K. Karger, Behelfsheim 99/100.

Italujo

Piombino. D: M. Bartolozzi, Via Garibaldi 35.

Japanujo

Huzisawa. D: S. Kawamura, Kameino 1866.**Kôbe.** D: S. Miyamoto, 68 Nisiyama-tyô, Asiya, Hyogo-ken. Tel: Motomaçi 2781.**Kyôto.** D: K. Sisido, Sakyô-ku Sisigatani Miyanomaetyô 82. Tel: Yosida (7) 1231.**Okayama.** D: D-ro Hideo Yagi, 76 Kawaramachi. Tel: 3892.**Otaru-si.** D: I. Yamaga, Hanazono-tyô, Higasi 3-tym. Tel: 1116.**Tôkyô.** FD (Japana lingvo): Prof. Yoshi I. Ishiguro, 784 Daita-2 chome, Setagaya-ku. Tel: Osaki 49-3117-9.

FD (Medicino): Prof. T. Nakayama, Oyaguchi-machi 724, Itabashi-ku. Tel: Itabashi (96) 2316.

Yamagata. D: D-ro H. Shinoda, 135 Sakurakozi, Kasumicho, Yamagata-shi. Tel: 5241.

Nederlando

Deventer. FD (Instruado): C. B. Zondervan, J. P. Sweelinckstr. 2. Tel: 4253 (K6700).**Haarlem.** FD (Komerco): H. J. Blokker, Bronsteewe 26, Heemstede. Tel: Haarlem 28432.**Tilburg.** D: J. C. van den Elsen, Mag. "De Gunst", Besterdplein 37.

Svedujo

Skånes Värjsjö. D: A. Ahlqvist, Korgmöbelfabriken. Tel: 1.**Stockholm.** FD (Elektrotekniko): S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, Johanneshov. Tel: 487469.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Santamarina, S-ro Antonio, Madrid, Hispanujo.

Santamarina, S-ro Luis, Madrid, Hispanujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950

272. Söderberg, S-ro K., Uppsala, Svedujo.

273. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo.

274. Persson, S-ro G., Astorp, Svedujo.

275. Stenström, S-ro J., Ulricehamn, Svedujo.

276. Brito, S-ro A., São Paulo, Brazilo.

277. Skogström, S-ro G., Drammen, Norvegujo.

278. Combe, S-ro J., Issoire, Francujo.

279. Hudson, F-ino C. W., Seaham, Anglujo.

280. Van Gindertaelen, D-ro T., Mechelen, Belgujo.

281. Pfanner, S-ro J. R., Gandorhun, Sieraleono.

282. Breth, S-ro F. W., Petrolia (Penn.), Usono.

283. Hehir, S-ro C. P., Kalgoorlie, Aŭstralio.

284. Alberich-Jofré, S-ro S., Barcelona, Hispanujo.

285. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando.

DONACOJ. A. Aglinskis 3\$. 6p., N. H. Divall 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Julio, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Julio 1949:

	1949	1950
Asociaj membroj ..	6654	6811
Individuaj membroj:		
MJ	744	800
MA	4120	4116
MS	352	286
Patronoj ..	15	15
DM	184	205
HM	57	56
	5472	5478
	12126	12289

CECIL C. GOLDSMITH, Sekretario

36-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MÜNCHEN, 4-11 AŬGUSTO 1951

Kongres-Oficejo :
(13b) MÜNCHEN-PASING, ENGELBERTSTR. 7,
GERMANUJO
Pêk : München 3804

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 36-a Universala Kongreso de Esperanto kaj
samtempe pagas
Familia nomo (1). S-ro, S-ino, F-ino.....
Antaŭnomo (Voknomo) (1).....
Strato kaj n-ro (1).....
Urbo (1).....
Provinco (1) (nur en lokoj kie la poŝto postulas tion).....
Profesio (2)
Nacieco (2).....
Lando (2).....
Antaŭnomo de edzino aŭ infano, kiu samtempe aliĝas al la
Kongreso
Naskiĝa jaro de persono malpli ol 20-jara
(1) *En nacia lingvo.* (2) *En Esperanto.*

INFORMOJ

Skribu klare, prefere per skribmaŝino aŭ presliteroj.

Nelonge post ricevo de la kotizo kaj aliĝilo oni sendos la definitivan karton al la kongresano. En konvena tempo ĉiu kongresano ricevos mendilojn por loĝejo, ekskursoj, k.t.p.

Blinduloj. Laŭ la kongresregularo blindulo kaj lia gvidanto ricevos senpagan kongreskarton ĝis la fino de marto 1950. Post tiu dato ili devos pagi kongreskotizon po duono de la ordinara tarifo. La aliĝilo de blindulo **devas** esti subskribita de blindula organizaĵo oficiale registrita, aŭ de okulkuracisto. Tiuj aliĝiloj **devas** alveni al la kongresa oficejo pere de esperantista landa asocio.

Donacoj por la kongresa kaso aŭ blindula kaso estos bonvenaj.

Ordinarajn aliĝilojn kaj pagojn akceptos ankaŭ UEA en Rickmansworth, Anglujo.

KONGRESO-KOTIZOJ

	ĝis 31-12-50	ĝis 31-3-51	poste
Kongresano	30 ŝil. (18 gm.)	35 ŝil. (21 gm.)	40 ŝil. (24 gm.)
Edzo aŭ edzino de kongresano	15 ŝil. (9 gm.)	17ŝ. 6p. (10.5 gm.)	20 ŝil. (12 gm.)
Junul(in)o, ne pli ol 20-jara	10 ŝil. (6 gm.)	12ŝ. 6p. (7 gm.)	15 ŝil. (8 gm.)

Aliĝilo sen pago estas senutila.

Leteroj de L. L. Zamenhof



La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus
retrovita korespondo kun la francaj
 eminentuloj. Prezento kaj komento de
Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906
388 paĝoj

2a volumo, 1907-1914
374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

NUNA PREZO: ĉiu volumo 21ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam
konigas detalojn de vivo, karaktero kaj
sentimento de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi
libro ne temas nur pri leteroj de la majstro,
sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la
movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon
kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

POR LA 36a KONGRESO

tre utila libreto estas

ESPERANTO IN DER TASCHE

WILHELM kaj HANS WINGEN

Ĝi enhavas mallongan gramatikon de Esperanto
por Germanoj kaj *bonegan frazaron* por ĉiu, kiu
intencas ĉeesti la kongreson

Prezo 3 ŝilingoj

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

VALOREGA MALNOVA KOLEKTO

(noj 403-653; 1927-28-29-30-31; proks. 1800 pĝ)

de Heroldo de Esperanto

estas vendota por aĉeti medikamentojn

Propono: USA \$ 40

GRAVA KOLEKTO DE ESP.O-LIBROJ
"kiel novaj" vendota

SERĈATAJ NUR NOVAJ

Internacia Mondliteraturo: n. 1, 5, 8, 10, 14, 19, 20, 21. Biblio-
teko Tutmonda: 11-12, 13-14, 18-19, 20. Verkaro Zamenhof:
Fabeloj 1^o, 2^o, Proverbaro, Lingvaj Respondoj 3a eld. Baghy:
Hura, Preter la vivo, Migranta Plumo, Pilgrimo, Dancu Marionetoj

POR ITALOJ! Poŝtaj respondkuponoj kontraŭ tre konvena
prezo! Infor. kontra. afr.

Cerri Esperanto-Servo - C.P. 89 - VARESE, Ital.

Afranku filatele!

Informoj kontraŭ prk (aŭ 2 UL-p-kuponoj)

23 rakontoj en unu libro
tute taŭgaj por komencantoj

PREMIAJ ROMANETOJ

96 paĝoj: afrankite 2ŝ. 8p. (8 rpk.)

La plej bonaj el 200
en konkurso aranĝita de
The Esperanto Publishing Co. Ltd.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo